

# LINGVA KRITIKO

## STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro: Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung; Robert Kreuz, LK.; Prof. D-ro Ing-ro R. Orenge. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114)

VOLUMO I \* N-RO 3

APRILIO 1932

### *La inventaro de nia vortrezoro.*

El la demandoj, kiuj prezentiĝas por nia lingvo, du estas la plej gravaj kaj urĝaj: tiuj pri la starigado de la teknikaj terminaroj kaj pri la kontrolado de la neologismoj. Ambaŭ estos diskutataj de kompetentaj samideanoj sur la paĝoj de „Lingva Kritiko“.

La neologismoj estas ordinare enkondukataj en nian lingvon ĉu pro estetikaj motivoj, ĉu pro la intenco traduki la plej subtilajn nuancojn de ideo, tiajn kiaj estas esprimataj de iu natura lingvo.

Flankelasante la unuan kialon, kiu postulas longan kaj fundan argumentadon, ni konsideru iom la duan kaŭzon.

Povas esti, ke la neceso esprimi nuancon neatentatan efektive ekzistas; sed, aliflanke, estas ankaŭ necese juĝi pri ĝi laŭ la unuopaj okazoj.

La neologismoj enkondukitaj por traduki ian nuancon de ideo precipe svarmas en ĉiu nacilingva-esperanta vortaro, ĉar ĝia aŭtoro, nature, penas traduki ĉiujn naciajn vortojn kaj ĉiujn sencojn de la vortoj. Sed tial ke, unuflanke, ne ekzistas vortaro esperanta, kiu registras ĉiujn vortojn, kunmetojn kaj esprimojn uzitajn de niaj klasikaj verkistoj, kaj, aliflanke, ĉiu vortaristo ne povas havi antaŭ la okuloj la verkojn de ĉiuj aliaj vortaristoj, ĉiu verkas sendepende kaj tial elpensas memstare novajn vortkunmetojn kaj neologismojn.

Tiel envenas en la lingvon amaso da necesaj sinonimoj, malbone elektitaj formoj, vortoj kiuj senutile, eĉ malutile, konkurencas kun aliaj vortoj ktp.

Nu, por juĝi, ĉu neologismo estas vere necesa kaj utila, oni devus kompari la derivaĵojn kaj kunmetojn uzitajn, la malsamajn neologismojn proponitajn, la veran kaj figuran senco de ĝiaj sinonimoj, la ideajn rilatojn kun sencnaraj esprimoj, la efektivan uzon de la ĉefaj eŭropaj lingvoj. Nur tiel oni povos atingi juĝon fortike starantan sur firma fundamento, kaj eviti aŭ senfinajn senutilajn diskutojn, bazitajn sur personaj preferoj, aŭ blindan alprenon por sekvu laŭmodan verkiston.

Kiel oni vidas, la prijuĝado de la neologismoj postulas longan tempon; kaj mi kuraĝas diri, ke ĝi estas nuntempe neebla pro manko de la necesaj laboriloj.

Nun la plej urĝa tasko estas starigi plenan inventaron de nia lingvomaterialo. Komence ni povos limigi la laboron, kolektante nur la neoficialajn radikojn entenatajn en ĉiuj vortaroj, ĉu esperanta-nacilingvaj, ĉu nacilingva-esperantaj.

Mi jam komencis ĉi tiun laboron kaj surslipigis la radikojn entenatajn en la vortaroj de Mezzini, Kabe, Verax, Presa Societo, Grosjean-Maupin, Christaller, Benne-

mann, Plena Vortaro, Wüster; sed mi estas certa, ke multaj samideanoj jam faris similan laboron, kaj mi petas ilin ke ili bonvolu interrilatiĝi kun mi, por ke mi povu kompletigi la sliparon.

La slipoj surhavas, krom la radikojn, ĝian tradukon en la ĉefaj lingvoj (mi proponus

### Urĝas evoluo de Scienca Terminaro.

Tre prave kaj ĝustatempe D-ro jur. J. Rathay levis la demandon pri scienca esperanta terminaro en Heroldo n-ro 644, ĉar jam urĝas, ke ni esperantistoj plejatenante zorgu pri ĉi tiu flanko de nia afero. Ofte ni rigardas la horizonton, kaj konstatas, kiom Esperanto progresas, ke la ekstera, dubema, mokema mondo vole-nevole konvertiĝas al la ideo, ke internacia lingvo ne nur estas profita, sed eĉ ebla; sed, kvankam ni rajtas pli esperi ol antaŭe, ĉu ni vere konceptas, kion signifus akcepto de nia lingvo flanke de la ĝenerala mondo, por la servoj, kiujn ĝi celas? Nebule certe, sed tro malofte ni klare prezentas al ni la sekvojn kaj respondecojn. Vere, akcepto mem ne estus plena venko, ĝi nur estus kvazaŭ ekiro sur la batalkampojn postlonga postfronta ekzerciĝo. Venos tiam la provtempo.

Post la akcepto, Esperanto ne estus pure kvazaŭa ideo, praktike funkcia provo atentigi pri la neceso kaj ebleco de internacia helplingvo, kiu povus servi en maniero neebla por la ekzistantaj naciaj lingvoj. Ne, per unu fojo ĝi konkurencos kontraŭ la naciaj lingvoj sur la inter- aŭ supernacia tereno.

Tiam ni devos absolute ne manki iurilate. La mondo neniel riproĉu nin; tio estus ruĝiniga. Por tiu tago ni estu pretaj, ekzercitaj, plene kapablaj enmanigi al la ceteraj tuj funkciigeblan aparaton. Alie, maskiĝos seniluziigo kaj malhelpo al progreso.

Nun ni batalas plejparte per la ideo, por kiu ni staras, uzante nian lingvon, por pruvi, ke ĝi estas efektivegebla. Poste, nia lingvo mem batalos por sia vivo — kaj en ia manoj de multaj, kiuj tute ne tiel amas flegos ĝian kreskon kiel ni, kiuj postuloj, ke ĝi servu por ĉiuj iliaj bezonoj.

La observoj de D-ro Rathay en lia propra sfero estas pro tio tre atentindaj kaj montras taskon, kiu staras kriante antaŭ ni por laboro. Jam ni pruvis, ke la ordinara, popola lingvo kapablas funkcii kaj vivi same kiel natura; ankaŭ en certaj fakoj estas simile. Sed ĉi tio ne dormigu nin pri la multflankeco de lingvaj aferoj, kaj ni laŭeble, ĉiu en sia propra medio, pripensu, ĉu

anglan, francaŭ, germanan, hispanan, italan, portugalan kaj rusan tradukojn); kaj estus konsilinde aldoni mallongan difinon esperantan de la signifo de la nacilingva tradukvorto.

La starigo de kompleta sliparo postulos eble unu-du jarojn; sed, poste, oni havus firman bazon por ĉiuj komparoj kaj konkludoj submetotaj al nia Akademio kaj Lingva Komitato por la fina decido.

Stefano La Colla, L. K.

li povos iel helpi, tiel ke la scienca kaj aliaj fakoj estu finpretaj por akcepto.

Se oni legas la raporton de la Ligo de Nacioj, 1922, pri Esperanto, oni rimarkas, ke tie estas speciale atentigite, ke en certaj fakoj terminaroj ankoraŭ ne estas el-laboritaj, kaj admonas la esperantistron dediĉi siajn zorgojn al tio jam tuj. Estas aparte ĝustatempe memori ĉi tion, ĉar dank' al la interesiĝo de la Brita Unuiĝo por la Ligo de Nacioj pri la helplingva demando, post la Oksforda Kongreso, nia afero preskaŭ certe aperos denove antaŭ la Ligo de Nacioj, aŭ pliĝuste almenaŭ antaŭ la Mond-edukada Konferenco sub ĝia aŭspicio post unu aŭ du jaroj (vidu artikolon en Heroldo n-ro 629, 17. 7. 1931).

Ke estos multaj kontraŭaĵoj al Esperanto, pri tio ni povas esti certaj, sed ankaŭ tion ni ne timu. La faktoj mem parolu. Necesas, tamen, ke ili ne parolu kontraŭ ni. Sceptikuloj ne povu montri nepretecon, lingvistaj spertuloj ne trovu ludejon por iniciati „reformojn“, aŭ komparu Esperantajn erojn malavantaĝe kun tiuj de aliaj projektoj. Unu forta helprimedo kontraŭ tio estas, laŭeble kompletigi nian sciencan terminaron. Kaj tiuj samideanoj, kiuj jam donacis sian talenton kaj energion, provizante nin per tia materialo, meritas eternan dankon. Iliaj laboroj daŭru kaj ricevu ĝustan rekompencon kaj rekonon. Kiel pene kaj malhelpate ili laboras, tion montras la ĉiujaraj raportoj de la Lingva Akademio pri Teknikaj Vortaroj. Ĉi tiu makulo devus esti forviŝata. La movado kiel tuto konsciitu ĉiam pli klare la gravecon de la tiel nomitaj teknikaj terminaroj, kaj sendube tiam leviĝos multaj pretaj helpantoj en mil fakoj.

Krome, la frukto de tia laboro estu pli facile akirebla por la ĝenerala publiko. Ekzemple, ĉu estus eble interkonsente kun la Lingva Akademio aranĝi, ke la faklistoj estu presataj samformate, tiel ke ili povu esti kunbindataj laŭvole per mekanika bind-sistemo? Oni povus tiam vendi kovrilojn por teni la unuopajn partojn per simplaj ŝraŭbligiloj, aŭ iel alie. Jamiagrada unueco estas atingita en presado de ŝlosiloj, kaj la plua ideo devus ne esti ekster nia kompe-

tenteco. Ĉi tiu metodo ne nur ebligus al ni kompakte kolekti ĉiujn prilaboraĵojn laŭvole, sed instigus ĉiam pli al kompletigo eĉ ĉiuj fakoj — kaj ni ne nur pripensu pure teknikajn, ĉar ekzistas multaj aliaj, kiuj ne estas konataj sub tiu klasifiko, sed ankaŭ estas gravaj, ekzemple sporto ĉiuspeca, flankokupoj, kiel slojdoj kaj kolektado, infanludoj, skoltismo kaj tiel plu, kiuj ĉiuj meritas apartan atenton. Diri, ke multaj tiaj vortoj jam ekzistas aŭ estas troveblaj en vortaroj, neniel deprenas de la dezirindeco ilin klasigi, ĉar ili fakte estas multe tro dise troviĝantaj kaj nur hazarde renkonteblaj aŭ trafeblaj per multa legado; sed se estus eble disponi klasifikajn listojn, oni po-

vus pli rapide posedi nian lingvon, ĉar estas ĉiam pli facile akiri vortojn laŭklase ol senrilate. Aliflanke, por la mondo, kiam ĝi akceptos nian lingvon, tio ankaŭ estus tre oportuna kaj allogus simpatian. Ni pli trafe povus plenumi la multajn postulojn, kiujn ĝi prezentus, kaj havus pretan ordigitan vortarsistemon laŭbezone etendeblan kaj aktualegeblan.

Tamen, ĉiukaze, ni konsciu la bezonon ĉiam pli evoluigi nian lingvon laŭ ĝia natura karaktero, kaj samtempe ekzerci nin en ĝia multflanka uzado, prepare por la celo, la tago kiam kroniĝos la laborado de D-ro Zamenhof kaj liaj milmiloj da samcelanoj.

E. D. D.

## Internaciaj vortoj.

De I. Lejzerowicz.

Sub tiu ĉi titolo aperis en la februara numero de la Geneva „Esperanto“ rimarkinda artikolo de Liem Tjong Hie. Estus dezirinde, ke ĉiuj eŭropaj esperantistoj estu legintaj tiun artikolon, kiu impresas kiel plendo kaj riproĉo, kiel seniluziigo kaj protesto.

Kion volas Liem Tjong Hie? Li protestas kontraŭ la multaj novaj radikoj, kiujn oni senbezone kaj superflue provas lastatempe enkonduki en nian lingvon. Li prave asertas, ke tiu vojo estas malbona kaj ĉe ambaŭ randoj de tiu vojo embuskas abismoj. La celo de Esperanto estas servi kiel universala lingvo, sed ne kiel nura tuteŭropa idiomo. Pro tio oni devas klopodi ke ĝi restu „facile“ lernebla ankaŭ por la vasta Oriento. „Ni en la Oriento estas same indiĝenoj en la lando Esperantujo kiel vi“ — admonas kun dolora riproĉo Liem Tjong Hie.

Mi ne estas lingvisto aŭ filologo, mi ne sekcas la lingvon, ne analizas, ne „torturas“ ĝin. Kaj eble pro tio Esperanto estis kaj restas por mi vivanta lingvo. Ĝi fariĝis parto de mia spirita vivo, kaj mi amas ĝin. Kaj ĉar mi amas ĝin, ĝi estas bela en miaj okuloj kaj oreloj. Kaj niaj kontraŭuloj povas riproĉi al Esperanto ĉion ajn tiel forte kiel ili nur deziras — tiuj riproĉoj eĉ ne tuŝas min. Kaj eble pro tio ĝuste la artikolo de samideano Liem Tjong Hie impresis mi tiel forte. Oni publikigis ĝin en la rubriko „Lingvaj studoj“, sed mi opinias, ke ĝi estas principa problemo en nia movado. Ne temas ja pri tiu aŭ alia ĉu radikoj ĉu formoj, pri lingva studo kaj kritiko. Pri nova malsono temas, pri pesto de neologismoj, kies flamoj ĉirkaŭprenas ĝuste nur la eŭropan esperantistaron, kaj kontraŭ kiu la grandega orienta mondo fine ekbatalas. Ne forgesu, ke Esperanto restas ja tamen eŭropa lingvo tiel laŭ sia konstruo kiel laŭ sia vortaro, kaj nur por ni ĝi estas malpli malfacila ol alia lingvo (eŭropa). Por la Oriento Esperanto restas esence fremda lingvo, kaj eble tute ne estas paradokse diri, ke la Oriento akceptas Esperanton same kiel ĝi akceptas (vole nevole) aliajn-fruktojn de nia eŭropa hegemonia kulturo.

Oni ofte konsterniĝas, legante novajn librojn aŭ gazetojn Esperantajn, pro la abundego da neologismoj svarmantaj nuntempe kaj ĉiutage plimultiĝantaj en nia lingvo. Iam ni apenaŭ konsentis pri enkonduko de „fremdvortoj“ (al kiuj la Fundamento tamen konsentas ian rajton), kaj nun oni facilanime fabrikas novajn vortojn eĉ nur pro tio, ke la ekzistanta Esperanta

vorto estas iom longa kaj malebligas rekrei la originalan ritmon en iu tradukata poemo. Eĉ en Eŭropo la esperantista „popolo“ plendas kontraŭ tiu plago, kion do diru la orientaj samideanoj, kiuj sen tio ne lernis tre facile Esperanton? Ne temas ja pri sporadaj neologismoj, sen kiuj finfine lingvo ne povas progresi. Sed fakto estas, ke nun fariĝas ia modo abunde uzi tute necesajn novajn vortojn. Laŭ la nombro de neologismoj oni provas difini la esperantistan perfektecon. . . . Se ĉiu el ni, antaŭ ol enkonduki ian neologismon, konsultus aliajn kompetentajn esperantistojn, ni eble evitus tiujn pravajn riproĉojn de la orienta amiko.

La lojaleco, mi, dirus la trankvileco, du niaj orientaj samideanoj fariĝas simple modela kaj impona: kion dirus la eŭropa esperantistaro, se niaj japanaj, ĉinaj aŭ aliaj orientanoj iun tagon komencus uzi centon da novaj azidevenaj vortoj? Kred-eble ankaŭ iliaj lingvoj posedas tiajn frandaĵojn, kiel lici, darfi, durfi, cico, morna, ekskuzi, fleŝo ktp. ktp. Ĉu Oriento ne estas egalrajta rilate Esperanton?

Kiam Zamenhof ekhavis la ideon krei lingvon tutmondan, nur unu terura sento premis lian koron: la timo al la dikigaj vortaroj. Kaj lia genio solvis mirinde tiun malhelpon, vekante admiron kaj rekonon de ĉiuj, kiuj lian verkon ekkonis. La facileco, la malgranda vortaro estis la sekreto, kiu igis Esperanton venki ĉiujn pli poste aperintajn projektojn, kiuj havis la vantan celon absolute imiti la okcidenteŭropan lingvojn. Pro tio eble eĉ la orienteŭropaj popoloj neniam elmontris interesigon por tiuj novaj projektoj, ĉar ilia strukturo kaj vortaro estis tute fremdaj por ili. Do ne tiu lingvo, kiu havas „plej eŭropan“ fiziionomion, sed tiu, kiu estas relative plej facila, plej simpla, estos rekonita de la tuta mondo. Dume kion la eŭropa esperantistaro faras? Ĝi konscie, eĉ kun ioma kontenteco, mem akcelas la dikigajn vortarojn, kvazaŭ tio estus vera feliĉo por la uzantoj de Esperanto. . . .

Ni ne forgesu, ke tiu protesto venas de orientanoj, kiu krom Esperanton scias minimume ankoraŭ unu eŭropan lingvon (eĉ en Eŭropo) lernas nian lingvon plejparte homoj, kiuj jam scias aŭ balbutas iun fremdan lingvon, do ni rajtas supozati, ke ili tamen tiun aŭ alian neologismon konas aŭ iel konjektas ĝian signifon. Do, kiel ni vidas, la neologisma afero fariĝas, cetere tute prave, principa afero. Kia estos la situacio, kiam oni fine oficialigos Esperanton kaj en la

Oriento oni komencos amase lerni ĝin? Nek la Zamenhofa radikaro, nek la listoj de la Lingvaj Institucioj sufiĉos. Ĉiu nova esperantisto devos havigi al si almenaŭ kelkajn vortaregojn de la okcidentaj lingvoj por povi serĉi en ili la signifon de la senbride enlingvigataj neologismoj!

Mi ripetas: ne temas pri eksperimenta uzado de tiu aŭ alia nova radikoj, sed pri danĝera aperaĵo en formo de amasa altrudo de neologismoj plej ofte superflua. Vole nevole ni devas en la nuna periodo iom re-konservativigi, por haltigi la disvastigon de tiu minaca modo. La Lingva Komitato devus ĉi tie interveni per sia morala aŭtoritato kaj iel reguligi, ordigi la aferon.

Ĝi estas maldolĉa vero, sed tamen vero, ke tiun plagon ni heredis de niaj „duonfratoj“: Ido, Occidental kaj aliaj apostoloj de okcidenta kulturo. Ni volas pruvi al la mondo la superecon de nia lingvo, ĝian pli logikan konstruon kaj plifacilecon, kaj dume ni mem infektiĝis per la plej danĝera trajto de tiuj projektoj: impresi kiel okcidenta lingvo kun riĉega vortaro, nefonetika skribmaniero ktp. „Hontigas“ nin la ŝajna malriĉeco de nia vortaro: kio por Zamenhof estis idealo, tio por ni fariĝas ĝenaĵo. Kaj ni forgesas, ke la malgranda (murfolia) Zamenhofa vortaro estis la mirinda paradoksa potenco, garantianta al nia lingvo riĉan vortrezoron.

Kaj ankoraŭ unu psikologia faktoro en tiu ĉi afero estu konstatita. La eŭropaj esperantistoj, verkante, forgesas plej ofte ke krom la eŭropa legantaro ekzistas miloj da esperantistoj en la Oriento kun alia (pli profunda) kulturo, kun diferenca pensmanero, kaj kun tute fremdaj por ni lingvoj. Se niaj verkistoj ĉiam memoros, ke iliaj libroj estas legataj ankaŭ de orientaj samideanoj, por kiuj la neologismoj estas grava malhelpo, ili certe estos pli singardemaj en la lingvouzo. Tio pli, ke ne nur la orientanoj malŝatas la malfacilitan Esperanton.

Parte niaj orientaj amikoj iom mem kulpas. Malgraŭ tio, ke ili stimulas viglan movadon en siaj landoj, ili mem kvazaŭ izolatas sin de Eŭropo. Almenaŭ oni povas ricevi tiun impreson. Se ili ne venadas amase al niaj universalaj kongresoj, tio estas komprenebla: kongresvojaĝo el Oriento estas multekosta kaj malfacila. Sed kial ili preskaŭ tute ne kunlaboras en niaj internaciaj gazetoj? Kial ili ne partoprenas pli aktive en nia literaturo? Kial nur tri azianoj troviĝas en la Lingva Komitato, kie ili certe povus utiligi sian influon en afero de lingvouzo, kiu en la nuna momento tiel multe koncernas ilin?

Tiu ĉi artikolo koncernas, kiel mi supre jam diris, principan aferon, malutilan aperaĵon, observeblan jam de du aŭ tri jaroj. Al s-ro Liem Tjong Hie ni ŝuldas dankon, ke li publike tuŝis ĝin en akra tono. Ankaŭ en Eŭropo la plimulto malkontente rigardas tiun malbonon kaj kontraŭ ĝi solidariĝas kun la orientaj amikoj. Ni komprenas la neceson de evoluo de Esperanto kaj pliriĉiĝado de ĝia vortaro. Sed ne en tia formo. Eble oni konsentos akcepti kiel bazon la Plenan Vortaron eldonitan de SAT, kiu devus sufiĉi por longa tempo? Finfine senkontrola (ofte senrespondeca) enlingvigado de neologismoj fariĝas danĝero. Esperanto ne estas projekto, super kiu oni povas fari similajn eksperimentojn. Tiujn ni lasu al Occidental kaj aliaj artefaritaj latinidoj. Sed Esperanto estas „vivanta lingvo de vivanta popolo“, kaj la voĉon de tiu popolo oni serioze devas atenti

# Scipovi Lingvon ...

## II.

Se ni konsideras nian patran lingvon, kaj ekzamenas detale la procedojn, per kiuj ni akiris ĝin, kaj la funkciadon de nia mentala mekanismo, kiam ni parolas ĝin, ni rimarkos, ke scipovi lingvon supozas tri distingajn operaciojn.

La unua konsistas en la konado de la lingva materialo, t. e. la formon kaj la sencojn de ĉiu komuna vorto — kaj tiujn, ne dank' al abstraktaj, leksikonaj difinoj, sed per la konkreta memoro de la kombinoj, kiujn ĝi faras kun aliaj vortoj. Efektive la infano lernas ne izolajn vortojn, sed nur vortgrupojn, kaj nur kiam li scias uzi tiujn de la kutimo fiksitajn vortarangojn, li konas la veran sencion de la vorto, eĉ se li ne kapablas ekzakte difini ĝin. Ne estas utila, ekz., por franco koni la precizan sencion de la vorto „arrêt“ kaj „décret“, se li ne scias, ke oni diras „rendre un arrêt“ sed „prendre un décret“ (eldiri decidon — dekreton); la grupoj „de premier ordre“ kaj „de première classe“ (unuaranga) ŝajnas sinonimaj por tiu, kiu ne scias, ke france oni diras ja „un compartiment de première classe“ (unuaklasa kupeo) sed „une maison de premier ordre“ (unuaklasa firmo), ĉar „une maison de première classe“ estus ridinda kaj aludus enterigadon. Same la leksikona senco de A. „hand“ (mano) ne sufiĉas por scii, ke, se „every man has two hands“ signifas „ĉiu homo havas du manojn“, tamen „we employ eight hands“ signifas „ni uzas 8 (kaj ne 4!) laboristojn“. Kaj nur la kutimo povas instrui, ke oni diras „the baton of a policeman“ (la bastono de policano), sed „a walking stick“ (promenbastono), sed „a cane of schoolmaster“ (bastono de instruisto). Nenio en la etimologio avertas la germanan parolanton, ke „es tut mir leid“ havas spiritan, kaj „es tut mir weh“ fizikan sencion (= tio min dolorigas), kaj li scios tion nur post plurfoja aŭdado de tiuj vortgrupoj en klariga ĉirkaŭteksto. Kiom precize oni konas la signifon de „Rang“ (rango), oni ne povas diveni, ke „im ersten Rang“ estas ne „je la unua rango“, sed „je la unua galerio“ (en teatro). „Bein“ kaj „Knochen“ (osto) havas la saman difinon, sed kiu dirus sen estigi rideton „auf Stein und Knochen schwören“ (juri per la barbo de l' profeto)?

Per tiuj kelkaj ekzemploj oni komprenas, ke la vortoj ne havas individuajn ekziston, kaj oni scias uzi ilin, nur post ol oni registris en sia memoro sufiĉe da frazoŝablonoj: lingvo estas nek sliparo, nek vortaro, sed plejparte aro da stereotipaj frazoj.

La dua operacio estas la konado de la procedoj, laŭ kiuj tiuj vortoj aŭ vortgrupoj ligiĝas inter si, kaj efikas unu al alia per reciproka influo. De tiuj procedoj estas du specoj: laŭ la unua la vortoj modifas sian formon por akordiĝi kun la apudaj; laŭ la dua, ili ŝanĝas sian lokon laŭ sia gramatika funkcio. Ekz. en germana aŭ rusa, specialaj dezinencoj montras, ke substantivo estas aŭ subjekto, aŭ objekta komplemento; male, en angla aŭ franca, nur la loko de la substantivo antaŭ aŭ post la verbo montras ĝian rolon. Sed en preskaŭ neniu lingvo regas unike unu el tiuj procedoj: eĉ en franca, specialaj dezinencoj indikas la akordon de la adjektiva epiteto kun ĝia determinato, en angla la akordon de la posedanto kun la posedato; kontraŭe en germana ekzistas speciala ordo por la verbo en dependaj pro-

pozicioj, por la apartigeblaj vorteroj ktp. Tiujn procedojn la infanoj lernas ankaŭ mekanike, per la sola efiko de la memoro, kiu liveras al ili kelkan nombron da modeloj, laŭ kiuj ili konstruas novajn frazojn, tute same kiel per unumura ŝablono oni povas ripeti la saman desegnon laŭ multaj koloroj kaj nuancoj.

Jen la du unuaj etapoj, per kiuj oni akiras la scipovon de lingvo: ambaŭ estas senkonscie aŭ preskaŭ senkonscie travivitaj; nur poste, kiam li jam scipovas sian lingvon, la adoleskulo konatiĝos kun la respondaj sciencoj, kiuj proponas al si tiujn ambaŭ operaciojn kiel studobjekton, la leksikologio kaj la morfologio kaj sintakso. Male la tria operacio postulas la ekzercon, krom de la memoro, ankaŭ de la inteligento kaj lingva gusto. Ĝi konsistas en la kolekto de pluraj preskaŭ sinonimaj terminoj aŭ parolturnoj, kaj en la ĝusta elekto inter ili por esprimi la precizan nuancon de la vortigota ideo. Tie ĉi la studo de la respondaj sciencoj, sinonimiko kaj stilistiko, multe helpas la lernanton, kaj en tiu ĉi kampo aperos lia eventuala lerteco aŭ eĉ talento.

Tiel oni povas resumi la manieron, laŭ kiu ni fariĝis normalaj parolantoj de nia patra lingvo. Kaj tiu mallonga skizo klarigis la manieron, kiel ni akiras fremdan lingvon. Ni denove trapaŝas proksimume la samajn tri etapojn, kun tiu grava diferenco, ke plej ofte ni devas postuli de nia racio multe pli grandan rolon ol de nia memoro, kaj tial enkonduki rezonadon en terenon, kiu preskaŭ ne toleras ĝin. Efektive, ĉar nia intelekto ne estas plu vaka, sed entenas jam multajn proprigitajn konceptojn kaj kutimojn, sed funkcias laŭ jam fiksita mekanismo, ĝi eksentus ĝenadon kaj malfacilon antaŭ nova lingvo, kiu penas trudi al ĝi novajn konceptojn, kutimojn kaj funkciadon.

Ni esploru ekz. la vortaron. Bone konata estas la fakto, ke samdevenaj aŭ samformaj vortoj ne vestas ĉiam samajn ideojn. Al la de B. Migliorini jam cititaj ekzemploj ni aldonu kelkajn. Mi supozas, ke neniu franco tradukus A. „primate“ (primato) per F. „primate“ (simio), aŭ A. „spectacles“ (okulvitroj) aŭ G. „Spektakel“ (bruego) per F. „spectacle“ (spektaklo). Sed ni legas ofte en francaj gazetoj „le contrôle des naissances“ (kontrolado de la naskiĝoj) por traduki (!!) la anglan esprimon „birth control“ (vola limigo de la naskiĝado); en iu franca gazeto tiu frazo de la „Times“ (23.8.23) „in spite of the fact that France has hitherto ignored the British Draft Note to Germany“ (spite de la fakto, ke Francujo ĝis nun ignoris la projekton por Brita Respondo al Germanujo) estis tradukita per „en dépit du fait, que la France a ignoré (= ne konis) jusqu'ici...“, kio estas simple absurda, ĉar la projekto estis jam oficiale komunikita al la franca registaro<sup>1)</sup>.

Estus facile prezenti samajn miskomprenojn inter francoj kaj germanoj, de la „Seigneur de la guerre“ (Sinjoro de la milito) stranga sed ĝenerala traduko de la G. „Kriegsherr“ (militestro) en la dumilitaj

<sup>1)</sup> Pri tiuj anglaj-francaj paronimoj, ni sendas al tri nepre konindaj verkoj: „Les Faux Amis“ de Derocquigny kaj Koessler — „Mots Français perfides“ de Derocquigny — „Le Vrai Ami du traducteur Français—Français“ de F. Boillot.

francaj gazetoj, ĝis „sanguinisch“ (de sangema humoro), kiun franca tradukisto komprenis kiel „sanguinaire“ (sangavida) atribuante al la pacamaj Vienanoj tiun monstran karakteron!

Sed eĉ pri la simplaj vortoj povas okazi miskompreno se ne kerna, kiel en la supraj ekzemploj, almenaŭ atentinda. Prenu ekz. A. „Foreign“: ĝi signifas ja france: „étranger“ (fremda). Sed en angla ĝi havas ofte malfavoran sencion: F. Boillot rakontas, ke iam kulturita Anglo diris al li „Excuse my calling you a foreigner“ (Pardonu, se mi vokis vin fremdulo), ĉar la vorto ŝajnis al li malĝentila. Kontraŭe france la adjektivo, kiu instinkte kvalifikas „étranger“ estas „noble“ (nobla), kaj la vorto estas por ni preskaŭ ĉiam favora. Simile oni diras „doux comme un mouton“ (milda kiel ŝafo) por esprimi, ke iu inklina ne koleri nek ribeli; germane „Schafskopf“ estas insulto, kiu aludas la stultecon de la preparolato. Plej sendangeraj vortoj, kiel „pano“ kaj „rizo“ elvokos ne la samajn ideojn nek metaforojn en la spirito de franco kaj de japano, por kiuj ili signifas aĵojn de tute diferenca valoro. Sume ni povas diri, ke inter du lingvoj la sencoj de vortoj, eĉ la malplej kompleksaj, neniam koincidas ekzakte kaj ofte prezentas danagerajn okazojn por miskompreno.

Konsideru nun la sintakson: ni trovos ankaŭ tie ĉi grandajn malfacilojn, kiuj malhelpas la lernadon de fremda naciilingvo. Se ni pripensas, ke en la plimulto de la okazoj, ni praktikis jam de dek aŭ dekkvin jaroj per ĉiutaga uzado nian patran lingvon, kiam ni komencas akiri alian, ni komprenas, ke ni ne povas rapide, nek eble tute perdi tiom da kutimoj en la arango de la vortoj kaj konstruo de la frazoj. Ĉiufoje, kiam nia atento iom laciĝas, sub la vesto de fremdaj vortoj distingiĝas la skeleto de nia patra sintakso. Mi havas italan amikon, kiu parolas france tiel bone, kiel mi mem; sed post du—tri horoj da konversacio, li ellasas foje frazojn, kiel „il est plus heureux de nous“ (li estas pli feliĉa ol ni), anst. la franca turno „que nous“, konforme al la itala „di noi“. Simile, en franca Bretonujo, en Quimper, mi aŭdis bretonon, kiu cetero tre bone scipovis nian lingvon, diri: „le médecin a été appelé avec mon fils“ (la kuracisto estis vokita kun mia filo) anst. la korekta „par“ (de), ĉar bretone la komplemento de l' pasivo estas konstruita kun „gant“ (kun). En kelkaj regionoj de Aŭstrujo, oni ofte aŭdas frazojn konstruitajn kun pli granda libero ol germane, pro la slava influo, ekz. „recht hat er“ (pravas li). „gut ist's gegangen“ (bone tio pasis). Kiam oni kutimiĝis paroli indiferente du lingvojn, fatale kaj senkonscie oni pasigas en iun la idiotismojn de la alia. Kaj la ekstermo de tiaspecaj eraroj, pli malpli multaj laŭ la studdaŭro kaj la klereco, ne povas iam esti kompleta.

La tria lernetapo, de ni antaŭe priskribita, prezentos al ni ankoraŭ pli gravajn obstaklojn. Pruve, ekster la propre scienca lingvo, kiu estas per sia difino mem preter la vivo, la esprimo de ideo enhavas ĉiam nuancon pri sento. Tiuj nuancoj esprimiĝas kompreneble per la tono, la voĉmodulado, la akcentoj, la gestoj, ktp. sed ankaŭ per pure lingvaj procedoj: la elekto inter vortoj kaj ties loko en la frazo. Inter F. „ennuyeux“ kaj „assommant“ (enuiga), „payer, verser, casquer“ (pagi), inter G. „sehr nett“ kaj „furchtbar nett“ (tre ĉarma), „bezahlen, blechen, berappen“ (pagi), inter A. „situation“ kaj „job“ (situacio), „a beautiful girl“ kaj „beautiful bunch“ (bela junino) kuŝas



diferenco ne de signifo, sed de emocia, senta valoro. Same inter F. „la vache à Colas“ kaj „la vache de Colas“ (la bovino de Nikolĉjo), G. „das Haus meines Vaters“ kaj „meinem Vater sein Haus“ (da domo de mia patro), A. „never I did hear such a noise“ kaj „I did never hear such a noise“ (mi neniam aŭdis tian bruon), ekzistas nenja logika diferenco, sed nur ia nuanco de tono. Evidente estas, ke la ĝusta uzado de tiaj nuancoj postulas tre longan kutimiĝon kaj studadon, kaj neniam fremdlingvano estas certa ĉe erari pri la vera koloro de iu vorto aŭ vortarango: efektive tian koloron oni povas obtuze eksenti, sed malofte klarigi per logikaj difinoj, kaj nur la ripeta aŭdado de ili, la blinda instinkto maskita de la kutimo povas utile averti la parolanton; sed por arkiri tiun instinkton, kiom longe oni devas partopreni la vivon de la koncerna popolo!

Mi provis ĝis nun montri, kiel malfacile estas scipovi lingvon, eĉ sian propran, des pli prave ian fremdan. Tio postulas longan praktikon kaj ekzercadon, ĉar la esprimilaro de granda popolo estas vasta, kompleksa kaj delikata mekanismo, kiun oni ne povas regi kalkmonate per la „rektaj metodoj“. En sekvonta artikolo mi esploros la demandon rilate al artefarita lingvo, kiel Esperanto.

G. Waringhien.

## Pri la montrado de la kazoj.

Pro analogio kun analizoj de naciaj lingvoj, oni ĝenerale parolas, en instrulibroĵ pri Esperanto, pri kazoj de la substantivo. Verdire tamen Esperanto, same kiel la plej konataj latinidaj lingvoj, ne konas kazojn, sed indikas tiujn cirkonstancojn, kiujn multaj lingvoj esprimas per specialaj kazoj, pere de prepozicioj. Tiuj prepozicioj formas kune kun la substantivo ideon, kiun oni povas esprimi ankaŭ per adverbo, ekzemple: **Mi iras piede**, aŭ: **per piedoj**, aŭ **sur miaj piedoj**. Respondu telegrame, aŭ: **per telegramo**. Li estas hejme, aŭ: **en la hejmo**.

En sia nuda formo, kiun en instrulibroĵ oni kutimas nomi nominativo, la substantivo aperas nur kiel subjekto de frazo aŭ tie, kie ĝi estas egaligata al la subjekto per la verbo „esti“ aŭ per verboj, kiuj en si enhavas la sencon „esti“, ekzemple: **Mia najbaro estas tajloro**. (Oni povas diri ankaŭ: **Tajloro estas mia najbaro**; tio ne ŝanĝas la sencon.) **La fremdulo ŝajnas (esti) amiko**. **La grupo elektis lin (ke li estu) prezidanto**. **La katastrofo faris lin (ke li estu) malriĉulo**. **Mi opinias ŝin (ke ŝi estas) samideanino**.

(Pri adjektivoj, kiuj estas ja nur akompanantoj de substantivoj aŭ difinantoj, la sama regulo estas aplikebla: **Ni opinias ilin (ke ili estas) taŭgaj por tiu tasko**.)

En ĉiuj aliaj okazoj (do: kiam la substantivo ne estas subjekto aŭ egaligata al la subjekto) prepozicio aŭ la finaĵo -n devas montri la rolon, kiun la substantivo ludas en la frazo. La substantivo, kiun ne estas subjekto de la frazo aŭ egaligata al la subjekto, ne povas stari nuda. Ekzemploj: **La tajloro parolas KUN virino**. Tiu bulko kostas du cendojn. **Ni foriris spite JE la pluvo**. Rilate JE tiu afero lia opinio estas grava.

Notu bone, ke la vortoj: spite, rilate, escepte, koncerne, laŭlonge, sekve, same kiel aliaj adverboj, kiuj en kelkaj naciaj lingvoj korespondas al prepozicioj, ne estas prepozicioj, sed adverboj. Oni do devas ligi ilin al la substantivo per prepozicio; ĉu oni

tie uzas la prepozicion je, al, de aŭ alian, tio dependas de persona prefero aŭ kutimo. Certe anstataŭ prepozicio oni povas en multaj okazoj uzi la finaĵon -n. **Koncerne al lia letero**. **Koncerne lian leteron**. Tiuj du esprimoj estas same bonaj.

Ekzistas ankaŭ unu prepozicio, kiu en plej multaj lingvoj (escepte de la slavaj) korespondas al adverbo, kaj tial ĝia uzo prezentas al multaj esperantistoj malfacilaĵon: la prepozicio „po“. Se oni volas uzi tiun prepozicion kiel adverbon (angle each, germane je), oni devas adverbigi ĝin. Do: **Mi donas al la infanoj po unu pomo** (prepozicio). **Mi donis al ili poe unu pomon** (adverbo).

Vortoj, kiel „kaj“, „ol“ ne estas prepozicioj, sed nur konjunkcioj (vortligiloj); oni do post ili devas uzi prepozicion aŭ akuzativan formon: **Ŝi amas la patron kaj la patrinon**. **Vi devas elekti pomon aŭ piron**. **Mi riproĉas la knabon pli ol la knabino**.

Tre ofte simpla formo kun -n (akuzativa) montras la rolon, kiun ludas substantivo, kiu ne estas subjekto: **Ni restis tie tri tagojn (dum tri tagoj)**. **Ili iris brakon sub brako (kun brako sub brako)**. **Paŝon post paŝo ni atingos la celon**. **Li promenas la ĉapelon en la mano** (aŭ: **kun la ĉapelo en la mano**).

Per la substantivo kun prepozicio aŭ, anstataŭ la prepozicio, la finaĵo -n ni esprimas cirkonstancojn (tempo, loko, manieron ktp.), kiujn oni en multaj okazoj esprimas per adverboj, la specialaj vortoj por tiu celo, ekzemple: **hieraŭ**, **etern**, **poste**. Ofte oni vidis ankaŭ longajn adverbigitajn formojn, kiel **brak-sub-brake**, **vid-al-vide**; sed preferinde estas, kiam la esprimo fariĝus tro longa kaj maleleganta, uzi substantivon kun prepozicio aŭ kun finaĵo -n.

Kiam oni pripensas bone tiun mekanismon de nia lingvo, oni komprenas, kiom simpla estas la aranĝo kaj kiom necesa estas la tiel-nomata akuzativo. Ĝi estas vere formo, sen kiu nia lingvo ne povus ekzisti kaj perdis sian logikecon.

Oscar Bünnemann, LK.

## Lingvistiko kaj Internacia Lingvo.

Kiajn signifnuancojn devas posedi internacia lingvo? Tiun demandon respondas Prof. A. Meillet, unu el la ĉefaj nuntempaj lingvistoj, recenzante la verkon de Prof. E. Sapir: *Totality*, en *Bulletin de la Société de linguistique de Paris*: „... same kiel la vortrezoro de la artefaritaj lingvoj povas esti utile kreata nur prenante la komunajn elementojn el la ekzistantaj lingvoj, oni distingas utile signifnuancojn nur ekzamenante, apudkonsiderante, komparante la nuancojn esprimatajn de la ekzistantaj lingvoj... Estas necese vidi kiel kondukas pri tio la grandaj kulturlingvoj, kaj tie ĉi oni ne devus flanklasi la araban kaj la ĉinan lingvojn...“

Interesaj rimarkoj, kiuj konfirmas la internacian vidpunkton kiun Esperanto celas. Ekz., la nuanco kiun esprimas la vorto **pluraj** flanke de la sinonimo **kelkaj** estas ne nur sufiĉe grava laŭ logika vidpunkto, sed ankaŭ sufiĉe disvastigata: pro tio la vorto meritis oficialigon.

La formo de la Esperantaj vortoj laŭ necese estas eŭropa: sed la lingvo entute devas resti tiamaniere simpla en sia gramatika strukturo, en la derivado de la vortoj, en la akceptado de la esprimotaj nuancoj, ke ĝi estu taŭga por la tuta mondo.

B. M.

## Ankoraŭ pri la relativo „kio“.

Eble ne estos senutile resumaj kaj kompletigi la tre interesan esploron de s-ro Meguru Takahaŝi aldumante kiel konkludon jenajn praktikajn regulojn:

1. Oni devas uzi la relativon **kio** anstataŭ **kio** se la antaŭaĵo, al kiu ĝi rilatas, estas korelativa vorto, esprimata aŭ ne, finiĝanta per **o** (**io**, **tio**, **ĉio**, **nenio**).

2. Se la antaŭaĵo estas neesprimata kaj estas ia sinonimo de **io** (aĵo, afero, objekto, k. s.), oni povas laŭvole uzi la relativon **kio** anstataŭ la ordinara relativo **kio**. Ekz.: „**La plej bona, kiun mi neniam esperis atingi, estas al mi plenumita (Z)**. **La plej bona, kion oni povas fari, estas . . . (Z)**.“

3. Oni devas uzi la relativon **kio**, se la rilatata substantivo, esprimata aŭ subkomprenata, ne estas ia malpreciza vorto samvalora kiel **io**. Ekz.: „**Tiu kajero estas la lasta (sk. kajero), kiun mi eldonis (Z)**. Oni trovas ĉe Zamenhof kelkajn ekzemplojn, en kiuj li uzas la pronomon **kio** en okazoj, kiam estus pli natura kaj pli logika la uzo de **kiu**: „**Mi montris klare, ke tia komitato, pri kio mi parolis, devus nepre elekti Esperanton (Kongreso de Washington)**. — **Mi ripetis, ke tio ĉi estas mia privata opinio, kio mi tute ne volas proponi al vi kiel ian oficialan programon (Kongreso de Cambridge)**. — **Ekzemple la forigo de la supersignoj kaj de la akuzativo, kio mi antaŭ 16 jaroj proponis (Kongreso de Washington)**.“

4. Oni povas uzi la neŭtralan relativon **kio** por rilati al tuta antaŭa frazo. Ekz.: „**Nun li havis tempon por ekzerci la soldatojn, kio estis lia plej amata okupo (B)**.“ Tamen estas konsilinde en tiu ĉi okazo uzi prefere la esprimojn kun demonstrativo **kio**, **kaj tion**, **sed tio**, **sed tion**, kiuj ĉiam estas pli klaraj.

Prof. E. Grosjean-Maupin.

La samideanoj, kiuj metis prilingvajn demandojn al Prof. Grosjean-Maupin, direktoro de la Akademia Sekcio por la Komuna Vortaro, kaj ne ricevis rektan personan respondan leteron, trovas la petitan respondon en „Lingva Kritiko“.

S-ro Grosjean-Maupin profitas la okazon por atentigi, ke lia adreso estas de nun: 44 bis Rue de la République, Nice (Alpes-Maritimes), Francujo.

## LINGVA TRIBUNO

### Ĝa interliga streko.

Kiam el du substantivoj oni faras unu solan, por formi unu pli klare difinitan ideon, ekzemple: **akvobotelo** el la vortoj **akvo** kaj **botelo**, oni devas skribi la novan ideon per **unu sola** vorto aŭ interligi la du partojn per **streketeto**. La streketon oni uzas, kiam la vorto sen ĝi fariĝus tro longa kaj tiel neklara, kaj ankaŭ por eviti miskomprenojn: **sendata letero** estas letero, kiun oni sendas, kaj **sen-data letero** estas letero, kiu ne portas daton.

Estas do necese, skribi ekzemple „**Esperanto-Asocio**“ kun interliga streketeto. Sen ĝi la esprimo ne havus sencon; ĉar du substantivoj status kune sen prepozicio, kiu klarigas la rilatojn inter ili. Do, oni povas skribi **Esperantokurso** aŭ **Esperanto-kurso** aŭ **kurso pri Esperanto**. O. Bünnemann, LK.

Ĉiun redakcian materialon sendu al s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italio; sed la materialo por „Konsilanta Gramatiko“, redaktata de s-ro Jung, estas sendota al lia adreso en Köln.